

Eŭropa Bulteno

Septembro 2012, Numero 119

KONTRIBUO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO AL KULTURA DIMENSIO EN EKONOMIA FORUMO EN KRYNICA



Dank' al oferema kaj senlaca klopodado de sinjorino Halina Komar en kontaktoj kun ĉeforganizanto de la Ekonomia Forumo (EF), la Instituto de Orientaj Studoj, organizanto de EF kaj precipe dank' al komprenemo de ĝia prezidanto Zygmund Berdychowski, kiu klare vidas gravecon de ideoj, rekomendoj kaj iniciatoj de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj organize sperta Peter Baláž de Edukado@Interreto, EEU sukcese partoprenis en EF jam la 8-an fojon. Ĉi-jare inter la 4a

kaj 6a de septembro EEU partoprenis kun sia teamo de reprezentantoj en la 22-a EF en Krynica, kies ĉefa temo estis „Novaj vizioj en malfacilaj tempoj: krizo konfrontas Eŭropon kaj la mondon“.

Ankaŭ ĉi-jare partoprenis EF-on pli ol 2600 partoprenantoj, inter kiuj estis pintaj ŝtataj kaj politikaj reprezentantoj, kiel ankaŭ ĉefoj de entreprenoj, asocioj, akademiaj rondoj, neregistaraj organizajoj de Pollando, landoj kaj institucioj de EU, Eŭropo kaj aliaj landoj de la mondo. Akreditaj estis proksimume 500 ĵurnalistoj. Dum la EF okazis 6 plekunsidaj diskutpaneloj kaj 120 diskutpaneloj dediĉitaj al diversaj subtemoj.

Malferman paroladon faris Bronislaw Komorowski, Prezidanto de Pollando, kiu atentigis, ke la tradicia monda forumo en la oriento de Eŭropo estas ŝanco por esplori novajn eblojn kaj elirvojojn de ampleksa kaj profunda krizo en kiu nuntempe troviĝas Eŭropo kaj la mondo.

Necesas serĉi novigajn solvojn kaj alproksimigojn kun ĉiuj EU-membroj kaj ankaŭ kun Kroatio, kiu fariĝos venontjare membro de EU, por ke la eŭropa integriĝo fariĝu alloga projekto por civitanoj. Estas necese, ke EU eble plej baldaŭ kaj sen precedencoj interkonsentu pri solvoj de financa, ŝulda, ekonomia, socia kaj morala krizo, kiuj konservas liberecon, respondecon kaj solidarecon. Novaj vizioj bezonas respondecan politikon, stabilecon kaj konkurenckapablon, enfokusigitajn precipe al homoj. Eŭropo devas fariĝi komunumo de civitanoj.



La ĉefgasto de EF estis Ivo Josipović, Prezidanto de Kroatio, kiu iĝos venontjare la 28-a EU membro-ŝtato. Li emfazis, ke novaj vizioj ne devus esti fokusitaj nur al financaj kaj ekonomiaj aferoj, sed ankaŭ al strategio kaj gvidado. La projekto de unuiĝanta Eŭropo de komenco estis konkurenca, kunordiga, kunlaboranta, inkluziviga kaj solidara komunumo. Tiuj ĉi trajtoj iom post iom

malfortiĝis. Politiko kaj ekonomio estas proksime interplektitaj. Eŭropo nun alfrontas ne nur financon, ekonomian kaj ŝuldo-krizon, sed ankaŭ krizon de demokratio, legitimeco, etiko kaj moralo. EU/Eŭropo bezonas novan, novigan kaj kreivan pensadon. Nuntempe mankas demokratio kaj legitimeco. Homoj konscias, ke ili ne estas ligitaj en la eŭropan integriĝon. Ili ne povas ĝin influi kaj estas skeptikaj kaj pesimismaj. Eŭropo ne estas kulture kaj socie justa. Estas bezonate oferti al juna generacio eblecon kaj plifortigi demokration. Eŭropo devas havi klaran celon kaj direkton fariĝi hejmo de ĉiuj civitanoj.

La pasintjara 21-a EF estis dediĉita al la temo "Eŭropa Dilemo: Partnereco au Rivaleco?" kaj atento estis ĉefe centrita al serĉado de solvoj de financaj, ekonomiaj kaj sociaj problemoj. Nur margena atento estis dediĉita al demokratio kaj demokratia deficiito en la EU/Eŭropo. Ĉi-jare pluraj pintaj politikistoj klare diris, ke en serĉado de solvoj kaj elirvojoj oni devas engaĝi ankaŭ civitanan socion por plifortigi demokration en ĉiuj sferoj de la vivo, sed precipe komenci doni atenton al evoluo de kulturo kaj kultura dimensio de la eŭropa integriĝo, kiu ĝis nun restis je nacia nivelo kaj signife postrestas ekonomian kaj pacan dimensiojn.

Pruvo pri tio estis partopreno de Irina Bokova, Ĝenerala Sekretarino de UNESCO, kiu en sia diskutkontribuo akcentis, ke vizio por superi profundan krizon en eŭropa kaj monda komunumoj ne povas esti fokusitaj nur al financoj kaj ekonomio, sed precipe al homoj, edukado kaj kulturo. Respondoj al ekonomiaj, mediaj kaj sociaj problemoj troviĝas en plibonigo de edukado kaj scienco, kiuj estas gravaj el vidpunkto de garantiigo de plua evoluo en EU/Eŭropo kaj la mondo. Ĉar temas pri multlingva kaj multkultura komunumoj estas ege grave dediĉi en estonta evoluo atenton al la kultura dimensio, multkulturismo kaj garantii lingvan kaj kulturan diversecon. Estas bezonate fokusiĝi al interligo de kulturo kun malsamaj ekonomiaj kaj sociaj kampoj. Kulturo estas unuiganta faktoro. Por superi la krizon estas ankaŭ necese evoluigi socian kapitalon kaj grave plifortigi la konfidon de homoj al procedoj de serĉado de elirvojoj.

Janus Lewandowski EU-komisionano, fine de sia kontribuo en la malferma diskutplena panelo ankaŭ atentigis pri grava fakto, ke EU landoj kaj ĝiaj civitanoj havas tre malaltan eŭropan konscion, kiu estas speciale evidenta je la monda nivelo. Tie dominas nur forta nacia konscio kaj fiero kaj mankas eŭropa aparteneco, konscio kaj simboloj. Ekzemple, la Olimpikoj en Pekino montris unuecon kaj koherecon de Ĉinio en organizado de la ludoj

hejme, kiu gajnis plej multe da medaloj en la konkursado. Je ekzemplo de la Olimpikoj en Londono en Eŭropo, EU klare venkus laŭ nombro de gajnitaj medaloj se oni adicius ĉiujn medalojn de EU landoj, sed ĝi ne kapablis montri sian eŭropan unuecon kaj praktike prezenti sian sloganon „unuiĝintaj en diverseco“. Tie dominis nur diverseco - nacia fiero, konscio kaj identeco. Per ĉi tiu ekzemplo EU komisionano atentigis pri grava fakto. Se EU volas esti sukcesa mondscale, ĝi devos en kreskanta konkurenco de novaj potenclandoj prezenti sian unuecon, koherecon kaj konfirmi sian sloganon. Por legitimigi la procedon de eŭropa integriĝado, por alproksimigi Europon al civitanoj, integriĝi ilin en la procedon kaj akiri ilian konfidon kaj plifortigi eŭropan konscion!

En la konkluda plenkunsida panelo Jaroslaw Gowin, Ministro de Justeco de Pollando, atentigis partoprentojn pri graveco de kulturo en la eŭropa integriĝo. Li akcentis, ke en serĉado de elirvojoj el la profunda krizo necesas legitimigi demokration kaj multajn etikajn problemojn inter landoj kaj civitanoj, klopodi solvi pere de kultura integriĝo kaj konstruado de mankanta unueco. Oni devas rekonstrui EU, ĉar la eŭropa integriĝo estas granda ŝanco por ĉiuj landoj de Eŭropo kaj ĝiaj civitanoj.



Ĉi-jare EEU organizis diskutpanelon pri la temo „Kulturo: ĉu ankaŭ eŭropa aŭ nur nacia?“ kaj havis post enirejo en ĉefa konstruado, en kiu okazis plenkunsidoj, bone videblan standon. Krom Halina Komar kaj Petro Baláž, en la diskutpanelo partoprenis Prof. Ilona Koutny de la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznan, Prof. Zbigniew Galor de la Altlernejo de Homa Scienco

kaj Ĵurnalismo en Poznan kaj Jozef Reinart de Ministerio de Eksterlandaj Aferoj de Slovakio. En la stando deĵoris Petro Balaž kune kun Agnieszka Mozer, Dorota Rodzianko kun Konstantin Tihomirov, kiuj informis partoprenantojn kaj disdonis informojn pri Esperanto, lingvo-politikajn materialojn, ekspoziciis interesajn lernolibrojn, librojn, revuojn kaj aliajn materialojn.

Kompare kun la pasintjara EF, en kiu nenia diskutpanelo estis dediĉita al kulturo, dum la ĉi-jara forumo kulturon traktis 3 diskutpaneloj. La unua "Kulturo, kiu faras diferencon" estis dediĉita al subteno, administrado, manaĝerado kaj evoluo de nacia kulturo en Pollando, Germanio kaj Hispanio. La dua panelo "La rolo de kulturo kiel stimulo por kreemo kaj novigo en regionoj" donis atenton al kulturo el vidpunkto de alligo de civitanoj en publikan vivon kaj evoluo de ilia kreemo, uzo de la scienco en la procezo.

La tria panelo estis dediĉita al la temo "Kulturo: ĉu ĝi povus esti ankaŭ eŭropa aŭ nur nacia?". Prof Ilona Koutny (HU) de Adam Mickiewicz Universitato en Poznan, enkonduke difinis kulturon en ĝia vasteco (ekzistas ĝis 200 difinoj de kulturo), interkultura komunikado en ekonomiaj intertraktadoj, diferencoj inter nacia kaj eŭropa kulturo, graveco de neŭtrala lingvo je eŭropa nivelo por efektiviĝi la sloganon de EU "Unueco en diverseco ". Prof Zbigniew Galor (PL) de Altlernejo de Homa Scienco kaj Ĵurnalismo en Poznan, atentigis pri kultura

apartigado surbaze de nacieco kaj eŭropeco, situacio de malsamaj kulturoj en Eŭropo en kapitalisma socio, apartigado en EU kiel pro naciaj kulturoj, tiel ankaŭ pro eŭropa kulturo. Li



atentigis pri bezono de evoluo de komuna eŭropa kulturo en harmonio kun naciaj kulturoj kiel anteŭkondiĉo de sukcesa daŭrigo de eŭropa integriĝo. Jozef Reinart de Ministerio de Eksterlandaj Aferoj de Slovakio, per ekzemplo de civitana iniciato de

EEU prezentita al EU, kiu estas simbola kontribuo al evoluo de eŭropa kultura dimensio, montris, ke per komuna kantado de eŭropa himno en la neŭtrala lingvo Esperanto povus civitano de EU prezenti sian solidarecon, koherecon kaj eŭropan konscion. Li ankaŭ informis pri kialoj kaj argumentoj de la Eŭropa Komisiono, pro kiuj ĝi malakceptis la proponon. Same li prezentis faktojn kaj argumentojn de EEU, kiujn ĝi uzos en siaj apelacioj al la Eŭropa defendanto de homaj rajtoj kaj se estos necese pro denova rifuzo de la proponita civitana iniciato, en sia plendo sendota al la Ĝenerala Tribunalo de EU por defendo de civilaj rajtoj, por havi eblecon kolekti 1 milionon da subskriboj en minimume 7 membroŝtatoj de EU. Lastmomente anonciĝis kaj partoprenis en la panelo Robert Ślusiarek, Direktoro de distrikta muzeo en Nowy Sącz, kiu informis pri agado de la muzeo por prezenti kaj protekti historiajn kulturaĵojn kaj valorojn de la regiono por nuna kaj estontaj generacioj kaj prezenti ilin al civitanoj de aliaj landoj de EU vizitantaj la regionon.

Fine de la EF Jozef Reinart renkontiĝis kun Zygmund Berdychowski, prezidanto de la Ekonomia Forumo, informis lin pri aktuala agado de EEU por lingva kaj kultura egalrajteco, vasta plurlingvismo kaj serĉado de solvo de lingvaj kaj kulturaj problemoj en EU/ Eŭropo kaj transdonis al li kelkajn lingvajn materialojn kaj filmdiskon pri multlingvismo kaj Esperanto. Nome de EEU li dankis al li pro lia 8-jara subteno de EEU kaj ebligis senpage partopreni en tiu ĉi tutmonda ekonomia forumo en orienta Eŭropo. Jozef Reinart alte taksis la fakton, ke ĉi-jare EF malfermiĝis kaj en ĝi estis organizitaj diskutpaneloj pri kulturo kaj tiamaniere kontribuis al malfermo de la evoluo de kultura dimensio enkadre de la eŭropa integriĝo, kiu restis ĝis nun je nacia nivelo kaj kaŭzas kumuladon de lingvaj kaj kulturaj problemoj.



Laŭ la EEU-teamo, la ĉi-jara partopreno en la EF estis sukcesa. Por ke nia venontjara partopreno estu pli sukcesa rekomendindas, ke EEU komencu la preparojn de sia partopreno duonjaron antaŭ EF. Unue, interkonsenti kun UEA, ESF kaj aliaj institucioj pri financa subteno de EEU-partopreno en EF. Due, sufiĉe frue proponi temon de nia diskutpanelo kunligitan kun ĉeftemo de EF kaj nomumi profesie spertajn panelistojn. Trie, rekomendindas kontakti instituciojn kaj fondaĵojn, kiuj organizas diskutpanelojn pri kulturo,

lingvoj, demokratio, homaj rajtoj, egalrajteco kaj aliaj proksimaj subtemoj kun propono

kunlabore organizi sinsekve 3 aŭ 4 diskutpanelojn, kiuj povus esti en EF prezentitaj kiel konferenco por evoluigo de kultura dimensio en EU/Eŭropo. Pere de kunlaboro kun aliaj institucioj kaj fondaĵoj, estontaj aliancanoj, ni povus plibonigi nian partoprenon kaj prezenton en EF. Kvare, post la 8-jara partopreno oni devas investi por venontaj jaroj certan sumon en preparo de pli kvalitaj banderoloj, afiŝoj, informaj kaj reklamaj materialoj. Gravus profesiigi nian partoprenon ankaŭ de materia flanko, por ke nia stando en venontaj jaroj el surmarketiga vidpunkto prezentu EEU kaj Esperanto-movadon profesie, alloge kaj per modernaj formoj kaj reklamiloj.



La 8-jara partopreno de EEU en tiu ĉi tradicia monda evento klare montris, ke ĝi estas eminenta kaj efika ebleco (dank' al subteno de Zygmund Berdychowski, prezidanto de EF, kaj permeso senpage partopreni, per kiu EEU ŝparas proksimume 8000 eŭrojn) prezenti al ekstermovadanoj ideojn kaj rekomendojn de EEU, Esperanton kaj ĝian movadon. Partoprenado de EEU en EF estas kontribuo al tuteŭropa diskuto pri subteno por vastigo de plurlingvismo, prezento de rolo de Esperanto en plibonigo de lingva

instruado, egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj demokratiigo de lingva kaj kultura politiko en Eŭropo.

La ĉi-jara EEU teamo en EF rekomendas al la prezidanto de EEU sendi al prezidanto de EF leteron por esprimi al li dankon pro lia ĝisnuna subteno al nia partopreno en EF, informi lin pri aktuala diverspeca agado de EEU, kiel membro de la Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo. En sia letero li povus proponi kunlaboron de EEU kun aliaj partoprenantaj institucioj kaj fondaĵoj por evoluigi kulturalan dimension enkadre de eŭropa integriĝo, kiu ekde ĝia komenco en 1957 grave postrestas la ekonomian kaj pacan dimensiojn, ĉar ĝi restis ĝis nun je nacia nivelo.

Jozef Reinart,
kunlaboranto de EEU-estraro

NIAJ LANDAJ MOVADOJ

IRLANDA ESPERANTO-MOVADO

La unua Esperanto-grupo en Irlando estis la Dublin Esperanto Group (Grupo Esperantista Dublina), kiu estis fondita en 1905. En 1907 fondiĝis Irlanda Esperanto-Asocio sub la prezido de E. E. Fournier d'Albe. Al la unua estraro apartenis bonkonata viro - Joseph M. Plunkett, unu el la sep subskribintoj de la Proklamo de la Irlanda Respubliko en 1916.

Dum la Unua Granda Milito 1914 - 1918 la Esperanto-movado dormetis. Fred Douglas, la tiama Sekretario de la Dublina Grupo, klopodis por la revivigo de la movado en Dublino post

la milito, kaj en 1925 ĝi estis reorganizita de Frank McCormack kaj Mortished kun la helpo de Hugh McNiell kaj S-ro Macaulay.

De 1925 ĝis 1930 Irlanda Esperanto-Asocio progresis, aranĝis klasojn, kunvenojn kaj prelegojn. Ĝi propagandis en ĉiuj rondoj kaj eldonis gazeton Irlanda Esperantisto, kiu daŭris de julio 1926 ĝis 1928. En tiuj jaroj fondiĝis ankaŭ Esperanto-sekcio de la Societo de Modernaj Lingvoj en Dublino. Tiu multe propagandis en la kadro de la Societo. En 1927 juna ŝtatservisto, Lorcán Ó hUiginn, aliĝis al Irlanda Esperanto-Asocio kaj post nelonge fariĝis ĝia Prezidanto. Li fariĝis ĉefdelegito de UEA kaj eldonis du gazetojn, La Kolombo por la interna movado kaj Irlando Vokas Vin por eksterlandaj esperantistoj.

Ĉirkaŭ la sama tempo la Irlanda Ligo de Katolikaj Esperantistoj revigliĝis. La nova estrararo estis: Honora Prezidanto - Rev. M. H. Gaffney O.P.; Sekretario - H. McNiell; aliaj estraranoj Gesinjoroj H. Macaulay, Rev. Br. Lawrence, Lorcán Ó hUiginn. La neŭtrala Irlanda Esperanto-Asocio kaj la faka ILKE amike kunlaboris kaj multe propagandis. De 1930 ĝis 1934 la movado dormetis. En 1934 estis neniŭ oficiala klaso, tamen multaj esperantistoj en diversaj rondoj kunvenis de tempo al tempo.

Ankaŭ en la Nordo de Irlando aperis kelkaj entuziasmaj esperantistoj, el kiuj la ĉefa estis Dr. E. A. A. Stonely. Li estis Vicprezidanto de la Belfasta Esperanto-Grupo, kiun li fondis post la dua mondmilito. Li esperantistiĝis en 1938, instruis en kursoj kaj multe propagandis. Do, la jaroj 1934/35 finiĝis kun multe da agado kaj multe da membroj - la oraj jaroj.

Dum la jaroj 1937, 1938 kaj 1939 la Movado vigle daŭris. Oni konstante kunvenis, dancis, ekzamenis kaj festis. Dum tiuj jaroj multaj irlandaj esperantistoj ĉeestis Universalajn Kongresojn en Vieno, Varsovio, Londono kaj Berno, kie ili salutis la kongresanojn nome de Irlanda Esperanto-Asocio. Ili ĉeestis ankaŭ la Katolikajn Kongresojn kaj aliajn landajn kunvenojn.

La milito en Eŭropo finiĝis la dekunuan de majo 1945. Ne ĉio haltis dum la militjaroj. Kvankam kontaktoj kun eksterlandanoj estis malmultaj, estis multaj kontaktoj inter irlandaj esperantistoj. Ili ofte kunvenis kaj ofte skribis unu al la alia. Ili faris planojn por la postmilita tempo. En Ballina, Co. Mayo, loĝis nova juna esperantisto, Liam Ó Cuirc, kiu fondis lokan klubon kaj multe propagandis. Tiu klubo certe estis la plej okcidenta en Eŭropo, frontante al la Granda Atlantika Oceano. Liam fariĝis delegito de Internacia Esperanto-Ligo (poste UEA) kaj post kelkaj jaroj li estis Sekretario Irlanda Esperanto-Asocio. Tio ne estis bona aranĝo, ke la sekretario estis en Ballina kaj la ceteraj estraranoj en Dublino. Malgraŭ tio, oni faris multe da propagando kaj retenis kontaktojn kun la multaj esperantistoj en la insulo. Dum la jaro 1953 multaj komencantoj ĉeestis la Esperantajn klasojn en la klubejo.

En 1968 aperis en la Sunday Independent longa artikolo pri Esperanto verkita de Liam Ó Cuirc. Samjare Irlanda Esperanto-Asocio anoncis ke pro invito de la Irlanda Asocio, la 53a Brita Kongreso de Esperanto okazos en Trinity College, Dublino, dum Pasko (4a - 7a de aprilo) 1969. La Kongreso tiujare estis efektive kunkongreso de la Brita kaj Irlanda Esperanto-Asocioj, kaj estis la rezulto de kunlaboro de du homoj, Jeremy Addis kaj Pat O'Reilly. La Kongreso brile sukcesis. Ĉeestis 200 esperantistoj el 13 landoj. Post la Kongreso oni ripozis ĝis 1970, kiam oni reorganizis Irlandan Esperanto-Asocion kaj renomis ĝin Esperanto-Asocio de Irlando. Oni petis kaj ricevis aliĝon al UEA. Laŭ ĝia unua Novaĵletero en februaro 1971 la sekretario estis P. J. O'Reilly, la kasisto Christopher Fettes, kaj la redaktoro de la novaĵletero Jeremy Addis. Pli poste Christopher Fettes fariĝis prezidanto de la Asocio kaj Joy Davies estis sekretario kaj kasisto. Joy estis kaj estas unu el la plej

kompetentaj sekretarioj kiun ni iam havis. Oni ankaŭ elektis kiel honoran prezidanton kaj patronon Harry Harrison, mondfama sciencfikcia verkisto kaj forta subtenanto de Esperanto.



Pli poste Liam Ó Cuirc elektiĝis kiel vic-prezidanto, Maire Mullarney kiel propaganda sekretario kaj Garbhan Mac Aoidh kiel komitatano kaj redaktoro de la Afrikaj Paĝoj de la reorganizita novaĵletero redaktita de Christopher Fettes. Ankaŭ refondiĝis Dublina Esperanto-Klubo, kiu seninterrompe kunvenis dufoje ĉiumonate, unue en Trinity College, poste en 87 Merrion Square, pli poste en 19 Upper Mount Street, kaj fine en 24 Burlington Road.

Ĉar ni nun alproksimiĝas al la nuntempo, mi mallonge listigos niajn ĉefajn atingojn en la periodo 1970 ĝis 1994. Unuafoje esperantisto, Trevor Sargent, elektiĝis ano de la irlanda parlamento. La Verda partio subtene menciis Esperanton en sia Elekta Manifesto. Somhairle Mac Aoidh laboris ce Esperantotur, Pollando. Dum la periodo 1970–1994 ni organizis jarkunvenon ĉiujare; aranĝis klasojn; traktis senpagan korespondan kurson; eldonis bonegan gazeton; helpis la Esperanto-movadon en Afriko; renkontis vizitantajn alilandajn esperantistojn ktp. La Dublina Kafeja Klubo kunvenis ĉiun semajnon sed diversloke. Gvidis ĝin Lorcan Mac Meanmain kaj Filip Ó Fathaigh.



Ĉiumonate (kutime en la unua aŭ dua tago de monato), la tiel nomata “Sabata grupo” kunvenas je la enirejo de la Universitato de la Triunuo (Trinity College), kaj post kuna mangaĵo, ekskursas aŭ kunestadas en iu agrabla restoracio, por konversacii kaj konatiĝi kun gastoj kaj novbakitaj esperantistoj, kiuj ĉiam estas bonvenaj. La jara kunveno aŭ loka kongreseto kutime okazas proksime al la fino de la jaro aŭ en Dublino aŭ aliloke.

Kvankam tre malgranda, EAI estas vigla kaj aktiva asocieto. Ĝia oficiala organo estas la bulteno Nova Irlanda Esperantisto, kies redaktoro estas Joy Davies, nia fidela ĉiofarantino. Diversaj libroj kaj aliaj publikaĵoj en kaj pri Esperanto estis eldonitaj de anoj de la asocio, inter kiuj la plej gravaj estis tiuj verkitaj de karmemora Maire Mullarney.



En 2002 irlanda diplomato kaj bona esperantisto, doktoro Seán Ó Riain elektiĝis prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio kaj restis en tiu pozicio ĝis hodiaŭ. Li ege aktivas internacie kaj eŭropkadre. Rezulte de lia aktivado en 2012 okazis tre sukcesa kongreso de EEU en Julio kun 157 partoprenantoj el 28 landoj. Okaze de la kongreso la ŝtatprezidanto de Irlando Micheál D. Ó hUiginn

aŭspiciis la kongreson kaj li kaj la ministrino de eksteraj rilatoj de Irlando Luncinda Craighton sendis al la kongreso tre pozitivajn deklarojn pri Esperanto.



Aldono

Libroj de irlandaj aŭtoroj tradukitaj en Esperanton

1. Ŝi kliniĝas por venki - komedio en 5 aktoj, de Oliver Goldsmith, tradukita de Motteau
2. Gulliver en Liliputlando - de Jonathon Swift, tradukita de Maud Inman
3. Salome - dramo de Oscar Wilde, tradukita de Hindrik Jan Bulthuis
4. Vojaĝo al Faremido - (daŭrigo de la rakonto pri la vojaĝo de Gulliver) de Johnathon Swift, tradukita de Frederiko Karinthy
5. Pigmaliono - dramo de Bernard Shaw, prezentita en Varsovio en 1959
6. Hundo de Ulstero, fabelo pri la irlanda heroo Kuhulano, tradukita de Joy Davies
7. La Noktmeza Kortumo - de Brian Merriman, tradukita de Albert Goodheir
8. La Petolulo de la Okcidenta Mondo - dramo de John M. Synge, tradukita de Albert Goodheir
9. La Graveco de Fideleco - de Oscar Wilde, tradukita de W. Auld
10. Omar Kajam - La Robaĵoj - tradukita el la angla traduko de Edward Fitzgerald
11. La Gaela Lingvo en Skotlando - Hodiaŭ kaj Hieraŭ - de Garbhan Mac Aoidh

Garbhan MacAoidh

LA NAŬA EEU-KONGRESO HAVIS GRANDAN SUKCESON EN EKSTERA PUBLIKO

Oni foje prave kritikas la kongresojn de Esperanto kiuj multe okupiĝas pri "umbilika kontemplado" kaj ne sufiĉe atentis la eksteran mondon. Tia kritiko certe ne trafus la 9-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kiu okazis inter la 16a kaj 20a de julio 2012 en la irlandana urbo Galivo (Gaillimh) kun 157 partoprenantoj el 28 landoj.

La prezidanto de Irlando, Michael D. Higgins, patronis la kongreson kaj sendis tre pozitivan mesaĝon, kiu substrekis ke "Esperanto apartenas al la komuna eŭropa kultura heredaĵo". Ankaŭ la irlandana ministrino pri eŭropaj aferoj, Lucinda Creighton, sendis simile gravan

mesaĝon. Gravus por la estonto de nia lingvo ke landaj asocioj provu havigi similajn deklarojn de la aŭtoritatoj de siaj landoj. Malfermis la kongreson la urbestro de Galivo, Terry O Flaherty.

La kongresa temo, „Lingvolernado en Eŭropo: lerni pli, kosti malpli“ estis aparte interesa por la irlandaj neesperantista publiko. La kongresa rezolucio celis la irlandan registaron kaj la Kipran konferencon pri multlingvismo kiu okazis de la 26-a ĝis la 29-a de septembro 2012. Ĝi petis la irlandan prezidantecon de EU en 2013 meti ‘multlingvismon’ inter siajn prioritatojn; kaj petis la kipran konferencon trakti la unuan edukon rekomendon de la Civilsocio Platformo pri Multlingvismo al la Europa Komisiono, “organizi pilotprogramojn en la lernejoj de pluraj EU-Membroŝtatoj por ekscii kiu dua lingvo plej multe kuraĝigas la sekvan lingvolernadon”. Tio lasta estas en la kadro de la oficiala EU-lingvopolitiko, akceptita far la Eŭropa Konsilio de Barcelono en 2002, ke “ĉiu eŭropa civitano lernu 3 lingvojn, la denaskan kaj 2 aliajn”.



Tri neesperantistaj irlandaj fakuloj prelegis en Esperanto - la nacia komisiito por oficialaj lingvoj, Seán Ó Cuirreáin; d-ro Nollaig Ó Muraíle de la Universitato de Galivo kaj d-ro Eoghan Mac Éinrí de la Universitato de Belfasto. Tio altiris la atenton de la amaskomunikiloj. Ankaŭ prelegis gravaj fakuloj esperantistoj kiel Wim Jansen, Renato Corsetti, Angela Tellier, Michele Gazzola, Nikola Rašić, Zlatko Tišljár, Jozef

Reinvar, Maja Tišljár, Tim Morley, Paul Gubbins, k. a. Flory Witdoeck tre bele kantis la eŭropan himnon komence kaj fine de la kongreso, kaj Petro Balaž organizis klerigan kaj junularan programon. Abundis la ekskursaj programoj tra tre bela regiono de Irlando, kaj ankaŭ kulturaj programoj, aparte elstaris irlandaj nacia vespero kun la fama irlandaj muziko kaj dancoj. Tre ŝatata estis la teatraĵo Ludoviko de Georgo Handzlik kaj Kabaredo de Handzlik kaj Saša Pilipović.

La irlandaj amaskomunikiloj montris grandan intereson, publikigis 11 intervjuojn en irlandaj televido (dum la ĉefaj novaĵoj de TG4), irlandaj nacia radio kaj anglalingve (2 FM, la plej aŭskultata nacia radio de la tuta lando), kaj irlandlingve (Raidió na Gaeltachta, Raidió na Life por Dublino, BBC Ulster por Nordirlando), kaj en la gazetaro (Irish Times, la FAZ de Irlando; kaj en multaj lokaj gazetoj).

La kongreso certe atingis sian celon plikonsciigi la irlandajn edukinstancojn pri la ŝanco uzi Esperanton kiel propedeŭtikilon. La organoj de EEU havis siajn kunsidojn: dufoje kunsidis la asembleo, kaj la estraro akceptis la inviton ke la urbestro de Nitra, Slovakio, ke la 10-a kongreso de EEU okazu en 2014 en tiu urbo.

Seán Ó Riain
Prezidanto de EEU

EU-KRIZO: LERNI DE NIAJ PIONIROJ

Estas sufiĉe konate inter esperantistoj, ke jam Zamenhof, en sia Alvoko al la Diplomatoj de 1915, revis pri la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. Iom malpli konate estas, ke la esperantista pioniro de Unuiĝinta Eŭropo, Josef Zauner, okupiĝis jam antaŭ ĉirkaŭ 80 jaroj pri la demando de komuna eŭropa valuto. En sia libreto „L' europanismo“ de 1934 li jam starigis la demandon: „Ĉu oni povas enkonduki unuecan eŭropan valuton sen politika unuiĝo?“ kaj respondis ĝin jene: „Ne. Nur post la politika unuiĝo estos eble krei unuecan valuton.“

Li skribis tion rekte en Esperanto, kaj la mondo ne multe atentis pri liaj vortoj. Hodiaŭ ni rikoltas la fruktojn, ĉar malekvilibroj kaŭzataj de komuna valuto kaj - samtempe - mankanta politika unuiĝo minacas pereigi Eŭropan Union.

Bonŝance alia pioniro de Esperanto, Edmond Privat, prezentas solvon en sia libro „Federala Sperto“ de 1958: Li montras laŭ la ekzemploj de Usono kaj Svislando, ke vera federacio kun potencaj centraj organoj kutime estas pli vivkapabla kaj pli prospera ol nura ligo de suverenaj ŝtatoj. Kiam mi nuntempe citas liajn vortojn en neesperantistaj forumoj, mi tuj rikoltas akran kontraŭstaron pro la onidira „diverseco de la eŭropaj popoloj“, kiu igas la kunigon de EU al vera federacio tute malebla. Sed Privat donas surprizajn citaĵojn pri samspeca kontraŭstaro en Usono kaj Svislando antaŭ la tieaj unuiĝoj al federacioj en 1787 respektive 1848.

La politikaj unuiĝoj, kiajn spertis Usono kaj Svislando jam en antaŭaj jarcentoj, povas esti modeloj ankaŭ por EU. Nuntempe Usono, malgraŭ eĉ pli altaj ŝuldoj, ne tiel suferas pro ekonomiaj malekvilibroj kaj krizoj kiel EU, kaj la ekzemplo de Svislando montras, ke eĉ lingva diverseco ne devas esti nepra obstaklo survoje al federacio (kvankam certe utilis ankaŭ komuna dua lingvo kiel Esperanto).

Se EU malpliigas la suverenecon de la membroŝtatoj en financaj, impostaj kaj ekonomiaj aferoj, ni povas pli facile venki la nunan krizon. Ni esperantistoj povas lerni de niaj pioniroj kaj aliĝi al la slogano de eŭropaj federalistoj: „La krizo finiĝos. Se tion ni deziras.“

Ulrich Matthias

MAZARADELVALO, 79-a Itala Kongreso de Esperanto HOMOJ KUN HOMOJ: LA PLURETNA INTUICIO DE ZAMENHOF

Historio, arto, maro, suno, gastamo, kuirarto. En Mazaradelvalo (Mazara del Vallo) partoprenis en la 79a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 17a ĝis la 25a de aŭgusto 2012 328 homoj. Kongreso ja itala, en kiu, tamen, pli ol la duono de la kongresanoj estis eksterlandanoj, ne nur el Eŭropo, sed el ĉiuj kvin kontinentoj: eĉ el Brazilo, Kanado, Madagaskaro, Aŭstralio, Rusujo, Sud-Kore(uj)o, Angolo, Kostariko, kaj aliaj.

Kongrestemo estis fama citaĵo el la festparolado de L. L. Zamenhof ĉe la unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer en 1905: “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof”. “Ni konsciu bone – tiam interalie diris Zamenhof – la tutan gravecon de la

hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maró kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.”



En Mazaro, jam ekde la unuaj kontaktoj, la Kongresa Komitato trovis ĉe la urbestro Nicoló Cristaldi ne nur grandan kunlaboremon, sed ankaŭ entuziasman aligon al esperantismaj idealoj, kiuj bone kongruas kun la karakterizaĵoj de urbo pluretna kaj plurkultura, gastigema kaj malferma, kia

Mazaradelvalo. Urbo pri kiu la urbestro mem deziresprimas, ke ĝi iĝu simbol-urbo de Esperanto.

Multnombris la kongresaj aktivajoj (raportoj, lingvo-kursoj por komencantoj kaj por progresintoj, teatraĵoj, koncertoj, referaĵoj diverstemaj, kunvenoj, ktp), kaj abundis ekskursoj al la belegaj vidindaĵoj de la okcidenta Sicilio, de Marsalo ĝis Agrigento.

Inter la iniciatoj, kunligitaj al la kongreso aŭ pro ĝi estigitaj, menciindas kursoj de Esperanto en ĉiuj Mazaraj lernejoj, en kiuj partoprenis pli ol 500 lernantoj, dum pluaj kursoj estas planitaj por la lernejo-jaro 2012-2013. Tre gravas, plue, eldonado de antologio de siciliaj verkistoj kaj poetoj, “Luigi Pirandello kaj aliaj Siciliaj aŭtoroj”. Altvalora 356-paĝa antologio, editorita de Carlo Minnaja, kun tradukoj fare de diversaj esperantistaj aŭtoroj, el verkoj de Pirandello, Capuana, Quasimodo, Verga, Rosso di San Secondo, Buttitta, Brancati, Vittorini, Sciascia, Lampedusa, Camilleri, Consolo, Bufalino, Dolci, De Roberto, Rapisardi.

La 80-a Itala kongreso de Esperanto okazos en Castellaro (provinco Imperia), en la ĉirkaŭaĵo de Sanremo, en aŭgusto 2013.

Amerigo Iannacone

LA JARO DE TIBOR SEKELJ 90-MINUTA FILMO

En artkinejo LIFKA en Subotica (Serbio) oni faris unuan prezenton de nova 90-minuta artfilmo kies aŭtoroj estas Stipan Milodanović kaj Josip File »Sur la spuroj de Tibor Sekelj«. Temas pri ekspedicio de la aŭtoroj en Suda Ameriko okazinta en 2005 dum kiu ili klopodis sekvi la vojojn kaj viziti la lokojn, kiujn siatempe vizitis Tibor Sekelj. Inter interesaj detaloj estas ankaŭ interparolo kun nevo de Kumewawa el Tupari tribo (Kumewawa mem ne plu estas vivanta) kaj pluraj homoj kiuj ankoraŭ memoris la renkontojn kun Tibor. En la filmo oni uzas plurajn lingvojn: la hispanan, portugalan, anglan, serban, esperanton...). Helpis ĝin

reĝisoro konata serba filmreĝisoro Želimir Žilnik kiu en posta interparolo kun esperantisto Đorđe Dragojlović esprimis la deziron iam mem produkti filmon pri Tibor Sekelj. Verŝajne la filmo baldaŭ haveblas en DVD-diskformo.

Zlatko Tišljar (laŭ la informoj de Đorđe Dragojlović)

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTAJ VERKISTOJ EN HRAŠČINA

En Nordkroata vilago Hrašćina-Trgovišće Kroata Esperanto-Ligo organizis la 10-an renkontiĝon de E-verkistoj kaj tradukistoj, kiu estis dediĉita al la verkista laboro de Tibor Sekelj. La renkontiĝo okazis la 15-an de septembro 2012. La aranĝon gvidis Spomenka



Štimec kaj partoprenis kvindeko da personoj el Kroatio, Slovenio, Hungario kaj Serbio. Unue la aranĝon enkondukis televida raportajo de Kroatia Televido en kiu fama televida raportisto Ivan Hetrich intervjuis Tibor Sekelj. Temas pri 45-minuta filmo en la serba, respektive kroata lingvo kun multaj interesaj detaloj el la vivo de Sekelj. La filmo estis filmita en 1984-a jaro.

Sekvis tre interesa prelego pri la literatura laboro de Sekelj, kiun prezentis Erzsebeth Sekely el Hungario, lia lasta edzino. Tibor verkis proksimume 30 librojn en tri lingvoj kiuj havis pli ol 100 eldonojn ne nur en la originalaj lingvoj sed ankaŭ en multaj tradukoj. Rekorda estis infanromaneto »Kumaŭaŭa – la filo de ĝangalo« kiu aperis en 24 lingvoj kaj ĉi-jare en pliaj du (eble ankaŭ tria). En 2012 ĝi aperis en la korea kaj la angla. Ekzistas ankaŭ la franca traduko, pri kiu oni ankoraŭ ne konas eldoniston. Kumeŭaŭa estis ankaŭ komerce kaj kvante la plej sukcesa lia verko. La japana dua eldono aperis en 300.000 ekzempleroj, ĉar ĝi estis rekomendita en okdekaj jaroj kiel unu el deko da plej interesaj infanlibroj por la bazlernejoj en Japanio. Tian eldonkvanton ne konas iu ajn alia libro originale verkita en Esperanto.

Sekvis la prelego de Zlatoje Martinov el Serbio kiu fakliterature recenzis la poemon de Tibor »Mi vizitas mian farmon - la mondon«. Poste la tradukintino de Kumeŭaŭa al la franca parolis pri problemoj rilate la tradukadon kaj maniero venki tujn problemojn. Sekvis prezento de kelkaj novaj libroj inter kiuj elstaras la libro de kroata verkisto Zdravko Seleš verkita en tri lingvoj: Esperanto, la norma kroata kaj lia ĝurĝevaca nordkroata kajkava dialekto.



La aranĝo estis garnita per du altvaloraj muzikaj eroj: mallonga koncerteto de Kaja Farszky per marimbo kaj pli ol unuhora koncerto de popularaj kanzonoj far Neven Mrzlečki (operkantisto en la Kroata Nacia Operejo). Ne mankis ankaŭ bona tradicia regalo per tipaj popolaj mangaĵoj kiujn preparis Jadranka Farszky kun la helpo de filino Kaja kronita per torto dediĉita al Tibor.

Dum la aranĝo la kroata televido intervjuis plurajn partoprenintojn

kaj elsendis preskau 10-minutan raportaĵon kelkajn tagojn poste en tre populara matena elsendo »Bonan matenon, Kroatio«.

Zlatko Tišljarić

REGIONA AGADO – Nowy Sącz JUBILEO 125 FESTITA DIGNE, INTERESE, KORTUŜE

Sonĉaj esperantistoj festis la jubilean Tagon de Esperanto 2012 en Urba Centro de Kulturo, kie jam pli ol duonjarcenton agas Esperanto-Klubo. Estas tie ĉi sekura nesto, ĉirkaŭita de amika protekto de ties direktorino Marta Jakubowska kaj ĉiuj homoj tie laborantaj aŭ agantaj socie. Tie troviĝas ne nur nia institucia adreso, sed nia vera domo, kie ni rajtas organizi konstantajn kursojn de Esperanto kaj ĉiujn gravajn eventojn de la loka E-vivo: prelegojn, koncertojn, kongresojn, integrigajn aranĝojn ktp.



Danke al ili nia festo estis grandioza kun 2-hora bela koncerto, dum kiu prezentis programon 3 bonaj junularaj ensembloj: „Junaj Voĉoj” kun esperantlingva kantrepertuaro, lerta knaba grupo „Breakdance” kaj fine spektaklo de dancistinoj Katharsis, kiuj montris venkon de Bono en batalo kontraŭ Malbono.

Gvidita de Jola Kieres kaj Ela Pachoń okazis kvizo pri Esperanto bazita je 25 lecionoj publikigitaj en grava regiona paĝaro „SADECZANIN” en periodo 2 – 26.08.2012. Venkintoj de la konkurso, sume 25 personoj, ricevis ekzemlerojn de „La Unua Libro”, represititajn de BES en Bjalistoko, kaj filmojn „Bela estas Sonĉa Tero”.

Tagon de Esperanto honorigis Prezidanto de Urba Konsilantaro Jerzy Wituszyński, mem esperantisto, iam eĉ partopreninta 3 foje UK-ojn kun sia familio. Ankaŭ al nia festo li venigis

8 familianojn (!), filojn kaj nepinetojn, per kio iĝis preskaŭ familia etoso en la salono. Li donacis belegan glason kun arĝente gravuritaj vortoj en du lingvoj, pole kaj esperante: „Okaze de 125-jara datreveno de internacia lingvo Esperanto, ni kore gratulas al Sonĉaj Esperantistoj kaj deziras al ili multe da sukcesoj”. Subskribite de prezidanto de la Urba Konsilantaro Jerzy Wituszyński kaj Urbestro – Ryszard Nowak.

Tre koraj bondeziroj kun gratulletero estis enamanigitaj per estraraninoj de la Sonĉa Universitato de Tria Aĝo Jadwiga Banach kaj Mariola Pękala-Piekarska, kun kiu E-Klubo kunlaboras jam la 8-an jaron. Ŝerce diris Halina Komar, gvidanta la feston, ke malfacile estas rimarki limon inter UTA kaj E-Klubo, ĉar ene de ambaŭ plej aktivis la samaj personoj. Specialajn dankojn ricevis Jolanta Kieres de organizaĵo „Radikoj kaj Flugiloj”, pro la protekto de infana grupo en vilago Rdziosłów, kie ŝi interalie preparas tieajn lernantojn al vojevodiaj konkursoj en Krakovo. En loka bazlernejo Jolanta jam 4 jarojn instruas Esperanton, kaj ŝiaj lernantoj estis jam 4-foje premiitaj en Krakovo pro arta programero en Esperanto.

La vespera programo estis kortuŝa – ĝi estis rakonto pri la unua lernolibro kaj ĝia kreinto, pri valoroj de la lingvo mem kaj amikigaj ecoj en ĝi, kio estas fenomeno de nia movado kaj certe helpis al Esperanto ekzisti jam 125 jarojn. Okazis ankaŭ invito de publiko al E-kursoj jam de oktobro 2012.

La festo finiĝis tre gaje kaj dolĉe: per grandega, kelketaĝa torto ornamita per jubileaj simboloj kiu estis donaco de kukejo „Szarlotka” kiel komplezŝuldo pro E-instruado de filino de la mastro. Oni disdividis ĝin al ĉiuj partoprenantoj de nia Jubilea Festo kaj tostis per vino, donacita de Jola Kieres kaj forprenita de profunda kelo de Halina Komar, akompanite de la kanto „Vivu la Stel” komencita de junaj knabinoj kaj poste kantata jam de ĉiuj gastoj! Ĉar la kutima kanto „Cent jarojn!” ne taŭgas al nia jubileo pli ol jarcenta, do – Vivu la Stel’!

Halina Komar

LA UNUA TED-X PRELEGO

La unua TED-prelego en Esperanto okazis dum la TED-X prelegserio en Madrido en septembro 2012. Prelegis gvidanto de Indjana movado David de Ugarte kaj la prelegon sekvis multmiloj da rigardantoj en you.tube. La prelego okazis en salono en Madrido antaŭ ducento da aŭskultantoj kaj estis granda sukceso, fakte ĝi finiĝis per granda ovacio kaj daŭre aperadis emociaj kortuŝaj komentoj rete, fare de ĉeestantoj, kiuj ŝategis la prelegon kaj havis la okazon aŭskulti la unuan fojon Esperanton en tiu ĉiam pli populara maniero prezenti seriozajn temojn por vasta publiko. En la prelego David de Ugarte parolis pri la Movado de Indjanoj.

Pliaj informoj en:

<http://kuriero.lasindias.com/la-unua-ted-prelego-en-esperanto-finigas-per-granda-ovacio/>

Manuel Ortega

Iom pli pri la Indjana movado:

La Indjana Kooperativa Grupo, transnacia organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun Intraespo kaj lanĉintoj de Kiberio, decidis adopti Esperanton kiel laborlingvon. Mi trovis tiun ĉi informon

en Virtuala Esperanto Klubo sed la membroj de la Grupo detale informas pri sia decido en la Indjana Kuriero. Ili prezentas plurajn kialojn kaj fine konkludas:

Ni indianoj komencis antaŭ du semajnoj studi kaj uzi Esperanton en nia labortablo por debati kaj labori. Kiu lingvo povus esti pli bona ol sinteza lingvo por komunumo kiu unuigas pro ideoj kaj projektoj, ne pro originoj, «ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj». Esperanto estas por ni: sinteza lingvo por sinteza komunumo.

<http://www.liberafolio.org/Members/cneidorf23/indiana-kooperativa-grupo-adoptas-esperanton-kiel-laborlingvon>

Germain Pirlot

LA EŬROPA CIVITANO FESTIS JUBILEON

Antaŭ proksimume unu jaro aperis en la interreto nova retgazeto en Esperanto »Eŭropa Civitano«. Temas pri tre unika novaĵletero pri aktualaj eŭropaj aferoj, gravaj decidoj, problemoj, atentigoj. La 11-an de septembro aperis la jubilea 200-a artikolo en la »Eŭropa Civitano«.

Okaze de tiu ĉi jubileo jen iom da statistiko:

Dum 8 monatoj la paĝaro ricevis 11.093 vizitojn el 70 landoj. La plej multaj vizitoj estis el Hispanio, poste sekvas Hungario, Italio, Usono, Francio, Belgio, Slovakio, Germanio, Svedio, Austrio, Kroatio kaj Pollando.

La plej multaj vizitoj okazis en aprilo, nome 1988 vizitoj.

La plej ofte legita artikolo estis »Proksimiĝas la granda kolapso«, la 7-an de aprilo.

Ofte mi pensadas pri tio, ĉu la 11.093 vizitoj estas multaj aŭ malmultaj. Ĉu la temoj estas sufiĉe interesaj? Ĉu mi sufiĉe bone provas transdoni la informojn al la legantoj? Ĉu tiu ĉi malgranda kaj modesta blogo havas ŝancon alvoki la atenton al la eŭropaj aferoj? Ĉu havas sencon publikigi tiajn temojn kaj artikolojn, kiujn la legantoj povas legi ankaŭ en siaj propraj lingvoj? La respondojn mi ne konas, tamen mi kredas, ke la tiaspeca civila agado estas grava. Jes, tio estas grava por nia lingvo, ĉar tio donas eblecon por trovi homojn kiuj simile pensadas pri la mondo. Kaj fine tio estas grava »ĉar ni vivas kune en Eŭropo«.

La redaktoro de »Eŭropa Civitano«

PLIAN FOJON ARANĜO EN NORDFRANCA STELLA-PLAGE

La dato de nia esperanta renkontiĝo en Stella-Plage alproksimiĝas (17an-18an de novembro). Tiuj kiuj partoprenis la antaŭajn jarojn tutcerte ĝuis la amikecan etoson kaj la belan kaj komfortan feriejon. Ĉi-jare ni denove provis starigi interesan programon: vi povos ĉu aŭskulti mirindajn rakontojn pri la grafo de Monte-Kristo kaj la milunuaj noktoj, ĉu prepari vin al la parola parto de la KER ekzamenoj kun Katalin Kovats (nia federacio fieras ke 17 samideanoj brile sukcesis la tutmondan skriban parton de la KER-ekzamenoj la 9-an de junio), ĉu serioze aŭ neserioze amuziĝi kun Sylvain Lelarge, ĉu prepari vin al la duagrada franca ekzameno, ĉu



lerni la lingvon se vi estas komenca(i)ntoj. Vi povas ankaŭ tutsimple babili inter bonaj amikoj kaj umi en la bela proksima urbo Le Touquet, kie samtage okazos la granda libro-salono. Dum la sabata koncerto vi ĝuos aŭskultante la belan basan voĉon de Jacques Yvart. Ne hezitu, aliĝu, kiel eble plej rapide, urĝas nun anonci la nombron da partoprenantoj al la feriestro.

Pliaj informoj: <http://esperanto.nord.online.fr/eo/index.htm>

Arlette Plutniak

LA RETEJO DE EŬROPAJ FEDERISTOJ PLIAMPLEKSIĜIS



Eŭropaj Federsitoj havas retejon kiu abundas per tre interesaj informoj kaj dokumentoj rilataj al eŭropa federista movado kaj peresperanta agado tiukampe. Laste ĝi estis pliampleksigita kaj ĉion pri tiu temo oni trovas en tiu ĉi retejo:

<https://sites.google.com/site/europajfederistoj/>

Nove estis aldonite:

- informoj kaj fotoĵoj pri Edmond Privat
- citaĵo pri la blogo de Eŭropa Civitano
- la verko "Federala Sperto" de Privat

Sur tiu paĝaro troveblas ankaŭ ligiloj al aliaj interesaj prieŭropaj retejoj:

1. Ĉefaj traktatoj de EU (Ĉarto de la Fundamentaj Rajtoj, Traktato de EU, Traktato pri Funkciado de EU) en esperanto en la retejo mem kaj kaj nacilingve en la retejo de la Eŭropa Konsilio
2. Asocio por Eŭropa Konscio – AEK: www.wix.com/dtislar/euopo kiu enhavas la Himnon de Eŭropa kaj la Eŭropajn Valorojn
3. Revuo Eŭropa Bulteno: <http://remush.be/bulteno/index.html>
4. UEF (Unio de Europaj Federistoj): www.federalists.eu/
5. Eŭrojargono: http://remush.be/europa.eu/abc/eurojargon/index_eo.htm

Legindaĵoj en la retejo:

- Federala Sperto/Privat E.
- Eŭropa Federismo
- landaj UEF-organizoj
- Laŭtema EU-terminareto
- EU-membroŝtatoj
- La manifesto de Ventotene

Rinaldo de Padova

DU MEMBROJ DE EEU EN GRAVA KONFERENCO EN KIPRO

En Kipro, en la urbo Limasol, mi partoprenis kun Seán Ó Riain lingvan konferencon (26 – 28-an de septembro) "Multlingvismo en Europo" organizitan de Europa Komisiono okaze de la EŭropaTago de Lingvoj, lige al la 10-a datreveno de la kunveno de Eŭropa Konsilio en Barcelono en 2002. Estis prezentitaj Eŭrobarometro 2011 pri multlingvismo en EU27, testado de lingvaj kompetentoj de mezlernejoj en kelkaj EU landoj. Transdonitaj estis ankaŭ premioj en konkurso de 27 lingvaj projektoj, kiujn konsideris ministerioj de edukado plej bonaj el proponitaj je nacia nivelo kaj rekomendis ilin al konkurso je EU nivelo. La ĵurio aljuĝis 5 premiojn inter kiuj ne estis niaj.



Krom interesaj prelegaj sesioj ni kontaktis kun Seán multajn prelegantojn kaj informis ilin pri rekomendoj de la Civitana Platformo "Linvolanĉilo", rekomendoj de la konferenco en Galivo kaj ankaŭ pri E@I kaj ĝiaj projektoj Slovake.eu, Deutsch.info kaj aliaj. Slovake.eu vekis intereson de multaj ĉar ĝi estas post 1,5 jaro tre sukcesa pri kio miris multaj. Mi povas diri, ke ĝi estas vere multlingva modelo de EU, kiu ne havas laŭ mi konkurencon el vidpunkto de subteno al instruado de malgranda nacia lingvo kaj

samtempe el vidpunkto de multlingvismo. Mi informis ilin ankaŭ pri intenco de nia slovakia ministerio/registaro aldonadi en la portalon iom post iom ĉiujn oficialajn lingvojn de landoj, en kiuj havas Slovakio diplomatajn misiojn, pere de kiuj ni povos efike prezenti Slovakion kaj se civitanoj de tiuj landoj estos motivitaj povos lerni la slovakon. Vi povas informi pri ekzemplo, peto de 60 mil slovakoj vivantaj en Argentino kaj decido de la Oficejo de slovakoj vivantaj en eksterlando kaj traduko de la paĝaro en la hispanan.

Jozef Reinart

NOVA KURSO POR STUDENTOJ DE VILNA UNIVERSITATO

La 5-an de septembro okazis la unua leciono de la kurso de Esperanto por komencantoj en Vilna Universitato (Litovio).

22 studentoj el diversaj fakultatoj elektis Esperanton kiel libere elekteblan studobjekton. La lecionoj daŭros dum la aŭtuna semestro.

D-ro Gediminas Degesys

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de aŭgusto 2012

Redaktoro: Zlatko Tišljär

En la numero kunlaboris: Jozef Reinvart, Garbhan MacAoidh, Seán Ó Riain, Ulrich Matthias, Amerigo Iannacone, Zlatko Tišljär, Đorđe Dragojlović, Halina Komar, Manuel Ortega, Germain Pirlot, Eŭropa Civitano, Arlette Plutniak, Rinaldo de Padova, Gediminas Degesys.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

